

INFORMACIJE

INFORMOJ

Leto / jaro 25, št. / n-ro 4

december / decembro 2020

Uvodnik

Frontartikolo

Niaj planoj de aktivecoj ĉi-jare ne taŭgas. La pandemio de la koronavirusa malsano plue renversas la programojn kaj malebligas multajn projektojn. Oni devas eltrovi kaj inventi novajn alirojn, metodojn aŭ vojojn. Telekomunikado fariĝis unuaranga kaj nepra.

Pli malfacile estas interkomunikiĝi kun personoj, kiuj ne primajstras komputilojn kaj saĝajn telefonojn. Al tiuj almenaŭ alvenas klasika poŝto kaj telefono. Karaj geamikoj, ne forgesu niajn izolitajn samideanojn, kontaktu ilin. Viaj skribaĵoj, telefonado aŭ eĉ vizito estos kore bonvenantaj.

Dejavnosti v naŝih organizaciih paĉ ne potekajo po letnih programih. Zaradi epidemie in varnostnih ukrepov iŝĉemo in tudi najdemo nove oblike dela. Od poletja dalje potekajo redna spletna sreĉanja in naĉrtujemo nova in bolje pripravljena. Ĉe je bilo prej obveŝtanj s pomoĉjo telekomunikacii le dopolnilna zadeva, je sedaj osnovna in vĉasih edina moĝna pot. V tej ŝtevilki biltena je opisanih precej aktivnosti in ŝe nekaj novih bo kmalu zaĝivelo.

Precej teĝe pa lahko doseĝemo tiste esperantiste in prijatelje, ki nimajo raĉunalnika ali pametnega telefona, elektronske poŝte, profila na druĝbenih omreĝjih itd. Poslali jim bomo tiskano izvedbo naŝega biltena pa ŝe kakŝna malenkost po poŝti. Ostane pa ŝe goreĉa proŝnja vam, dragi bralci, da pokliĉete v tem teĝkem ĉasu in zlasti zaradi praznikov svoje in naŝe prijatelje in somiŝljenike ter z njimi pokramljate. Veseli budo vsake novice in vam budo hvaleĝni za skrb. **O.K.**

Iz dejavnosti ZES

El la agado de SIEL



ZDRUŽENJE ZA ESPERANTO SLOVENIJE • SLOVENIA ESPERANTO-LIGO

Esperantaj kursoj kaj rondoj en Slovenujo rete

Ni kolektis aktualajn datumojn pri retaj esperantaj kursoj kaj rondoj en Slovenujo. La kursoj intencas servi ĉiujn nivelojn de la lingva scio kaj estas atingebblaj por

ĉiuj, ne koncerne la statistikan regionon aŭ komunumon; gravas nur, ke oni havas liberan tempon dum difinitaj fiksitaj horoj. La bezonata ekipaĵo konsistas el hejma komputilo kun laŭtparoliloj kaj eble videokamero, aldone estas rekomendinda »saĝa« poŝtelefono por faciligi interaktivajn ludojn, kvizojn, enketojn k.t.p.

Kurso Slovenj Gradec: marde je la 14:00 kaj ĵaŭde je la 18:00, gvidas Davorin Juraĉ, enskribo ĉe davorin.jurac@gmail.com

Kurso Kranj: marde je la 18:45, gvidas Gregor Markiĉ, enskribo ĉe gregor.markic@gmail.com

Kurso Izola: ĵaŭde je la 14:00, gvidas Peter Grbec, enskribo ĉe geo9214@gmail.com

Antaŭ la komenco de la intervidiĝo, la enskribiĝintoj ricevos per retpoŝto la ligil-kodon.

Se okazos ia ŝanĝo de la fiksitaj horoj aŭ datoj, ni informos vin per nova cirkulero de SIEL. Nepre almenaŭ provu eniĝi en iu el la kursoj por ekkoni la procedojn kaj eblojn de reta komunikado. Pli spertaj konferencistoj povos, interkonsente kun la konferencgvidanto, kontribui siajn aldonajn temojn. **O.K.**

Proslava Zamenhofovega dne in Dneva esperantske knjige bo na spletu s pomoĉjo storitve Zoom

v torek, 15. decembra 2020 ob 18.00.

Povezavo in kodo boste prejeli z elektronsko poŝto. Veĉ informacii na <https://eventaservo.org/Reta>

Poziv za donaciiu dela dohodnine

Naŝa davĉna zakonodaja omogoĉa podariti do 0,5 procenta odmerjene dohodnine obĉana izbrani upraviĉeni organizacii. Ĉe obĉan – davĉni zavezanec tega ne nareĉi, gre ta znesek v druĝveni proraĉun za ŝploŝne namene. Vsekakor velja, da darovalca ta donaciiu ne stane niĉ.

ZES poziva vse esperantiste in prijatelje esperanta ter druge naklonjene osebe, ki tega ŝe niso nareĉili, da nameniiu del dohodnine v dobro naŝe organizacii, ki bo tako zbrana sredstva gospodarno uporabiiu za izvedbu programa in projektov v korist vseh slovenskih esperantistov. S temi sredstvi bomo podprii tudi projekte naŝih kolektivnih ĉlanov EDL, EDM, ŜEDM in ESKDSG.

Tistim, ki so že namenili del dohodnine naši organizaciji, ni treba letos narediti nič, saj lanska odločitev velja naprej do morebitnega preklica ali spremembe. Če ne veste, ali darujete del dohodnine, lahko to preverite na dva načina: elektronsko z vstopom v svojo dohodninsko dokumentacijo v aplikaciji *e-davki* ali preprosteje s pogledom v svojo dohodninsko odločbo – na koncu obrazložitve, malo pred pravnim poukom, je navedena obdarjena organizacija in znesek te donacije. ZES zaradi varstva podatkov namreč nima seznama darovalcev.

Zahtevo za podaritev dela dohodnine vložite pred koncem tega leta. Če ste že kdaj prej vložili drugačno zahtevo, bo nova zahteva staro avtomatsko razveljavila.

Kako vložiti zahtevo za podaritev dela dohodnine? Na voljo sta dve poti: izpolnitev obrazca »Zahteva za namenitev dela dohodnine za donacije« ter dostava tega na območno enoto FURS ali pa izvedba zahteve po elektronski poti preko spletišča *e-davki*, če imate digitalno potrdilo.

Opravite to skromno formalnost na našem obrazcu takoj, da ne pozabite. Čas do novega leta bo ob množici drugih opravkov in skrbi minil v trenutku. Če morete pridobiti še druge donatorje, boste veliko prispevali za našo stvar.

Seja Izvršnega odbora

Zaradi epidemije covid-19 je predsednik Jug sklical spletno sejo Izvršnega odbora ZES kot videokonferenco s pomočjo aplikacije Zoom. Tako se nas je 2. decembra ob računalnikih vsak v svojem domu zbralo 6 od 7 članov IO ZES. Dnevni red in nekaj gradiva smo pred sejo prejeli po elektronski pošti.

Najprej smo obravnavali možnosti za izvedbo proslave Zamenhofovega dne. Načrtovanega srečanja v Mariboru ni možno izvesti, zato smo sklenili, da bo proslava v obliki videokonference v torek, 15. decembra ob 18. uri. Konferenco bo gostil Janez Jug s storitvijo Zoom. Predhodno bodo vsi naši člani in prijatelji esperanta z okrožnico prejeli povezavo in kodo za priključitev videokonferenci.

Določili smo 7 točk programa proslave tako, da bo nekaj stroke in zgodovine esperanta v Sloveniji in nekaj kulture. Programa bo za eno uro, vendar je možno podaljšati konferenco zlasti z razpravo pri točki, ki je namenjena našim načrtovanim aktivnostim v bližnji prihodnosti.

IO ZES je pozval društva in posamezne člane, naj posredujejo svoje načrte aktivnosti za čas epidemije in

omejitev druženja. Namen tega je uskladitev spletnih aktivnosti, saj trenutno potekajo štirje redni spletni tečaji, a so po vsebini podobni, vsi so namenjeni raznim stopnjam znanja. Tečaje bomo organizirali tako, da bo Peter Grbec prevzel začetnike iz vse Slovenije, Davorin Jurač drugo stopnjo ter Gregor Markič in ZES pa višjo stopnjo vključno s strokovnimi predavanji. Še naprej bo potekalo obveščanje z okrožnicami, izdajanje biltena ter oglaševanje dogodkov na fejsbuku, Eventoservu in Kurseju.


Podan je bil predlog za skupinsko naročilo Zamenhofove knjige *Fundamento de Esperanto* pri UEA, saj so ugodna cena knjige (15,- €) in manjši stroški pošiljanja dobra priložnost za nabavo pomembnega vira znanja.

IO ZES je potrdil stroške nabave literature za strokovno knjižnico in stroške knjižnih daril iz zaloge za leto 2020.

Naslednja seja IO ZES bo čez en teden ob istem času, sicer pa bodo po začetnem krču spletne seje bolj redne, vsaj vsak mesec in pol. **O.K.**

Skupno naročilo PMEG 2020

Na pobudo Tomaža Longyke je ZES z okrožnico 21. oktobra pozval članstvo k skupnemu nakupu nove, to je druge knjižne izdaje Popolnega priročnika esperantske slovnice (PMEG 2020, ustreza elektronski verziji 15.2) avtorja Bertila Wennegrena, člana Esperantske Akademije. Zbrali smo 7 naročil in tako dosegli nižje stroške pošiljanja. Knjige so bile dostavljene v Ljubljano 25. novembra in od tod razposlane naročnikom. Med naročniki je tudi strokovna knjižnica ZES in bo ta slovnica na razpolago tudi obiskovalcem klubskih prostorov.




PMEG 2020 je obsežna knjiga na skoraj 750 straneh s podrobno obravnavo slovničnih pravil in jezikovne prakse z mnogimi primeri. Avtor snov v elektronskih verzijah stalno dopolnjuje in aktualizira. Za učitelje

esperanta je ta priročnik nujno potreben, saj omogoča odgovoriti na večino dilem in nejasnosti v esperantski slovnici. Seveda je vsebina PMEG 2020 na razpolago tudi na spletu, kupci knjige pa bodo dobili brezplačen dostop do te najnovejše verzije, ko bo ta pripravljena in objavljena. **O.K.**

Spletni tečaj Izola

Kot nadomestilo za tečaj esperanta v MGC Izola je Peter Grbec že oktobra začel redni spletni niz videokonferenc v enakem terminu, to je vsak četrtek ob 14. uri. Uporabljena je storitev Google Meet. Na povabilo voditelja se odzove 10 do 15 udeležencev iz vse Slovenije in tujine, saj je tečaj objavljen tudi v rubriki *Kursejo* na spletišču *Edukado.net*. Udeleženci imajo različno predznanje, zato so nekatere vsebine enim prelahke, drugim pa pretežke. Vendar se Peter potrudi obrazložiti slovnico in posamezne besede tudi s pomočjo drugih udeležencev.

Da ne bi bilo poučevanje preveč šolsko, si je Peter zamislil kvize iz esperantske slovnice. Vsebine je priredil za ta tečaj iz izpitnih vprašanj za KER stopnje A2, B1 in B2. S pomočjo aplikacije za kvize na spletišču *Kahoot.it* je pripravil niz kvizov obsega do 35 vprašanj vsakokrat. Na vprašanja so možni štirje odgovori v omejenem času, a le eden je pravi. Aplikacija izvaja vso administracijo kviza, preverja odgovore, meri porabljen čas za odgovor, točkuje tekmovalce in jih razporedi po uspešnosti.



La reta kurso Izola estas la plej frekventata

Tako igranje pritegne in čas tečaja bliskovito mine. Ker je Peter objavil te kvize in omogočil dostop vsem, jih za zabavo preigrajte in se pri tem kaj naučite. Če nimate linka in kode za igranje, se registrirajte v

aplikaciji Kahoot!. Nato poiščite pripravljene kvize z geslom v polju za iskanje: Gramatiko de Esperanto.

Poleg kvizov so udeleženci tudi pregledali in pocomentirali slikovne kartice *MIGo (Malgranda Ilustra Gramatiko)*. Te so dosegljive na *Pinterest.com*, ki tudi zahteva registriranje, na primer preko fejsbuka. Potem imate dostop do veliko grafičnih rešitev s področij, ki si jih izberete.

Zaključna ugotovitev je, da nas je epidemija in omejevanje fizičnih stikov zblížala na spletu in prisilila v odkrivanje novih možnosti v virtualnem svetu ali, če hočete, v digitalnem veselju. **O.K.**

Iz dejavnosti EDL

El la agado de ESL



ESPERANTSKO DRUŠTVO LJUBLJANA
ESPERANTO-SOCIETO LJUBLJANA

Esperantski krožek v Kranju

Esperantski krožek v MCK se je zaradi epidemije korone spremenil v vsakotedensko torkovo spletno druženje ob 18.45, ki ga vodi Gregor Markič. Tako so združena srečanja v Kranju vsak drugi in četrti torek ter v Ljubljani vsak prvi in tretji torek v mesecu. Gregor uporablja odprto aplikacijo Zoom, ki ima stalno kodo za povezavo in ni potrebno za vsak termin posebej vabiti in pošiljati kode za priključitev.

Krožek Kranj, kakor ga kratko imenujemo, je odprt za vse, ne le za članstvo ED Ljubljana. Tudi raven znanja esperanta ni pomembna. Gregor izbira različne vsebine za učenje in utrjevanje znanja, pa tudi samo obveščanje in pozdravljanje med udeleženci je dobrodošlo. Med napornejšimi vajami je opisno definiranje besed v esperantu ter prevajanje raznih besedil v esperanto. Lažje je tekmovali v testih s pomočjo pametnega telefona (testi s spletišča *quiz.let*) ali zapeti skupaj pesmico. Pred posameznim sestankom ali pa po njem Gregor po navadi pošlje prijavljenim udeležencem gradivo ali povezave na spletna mesta, kjer lahko gradivo najdemo.

Udeležba na spletnih sestankih se spreminja glede na prosti čas udeležencev. Kranjskega krožka se udeležuje do 10 oseb. Dokaj redno sta prisotna tudi voditelja drugih spletnih tečajev, Peter Grbec in Davorin Jurač. Tako se znanja dopolnjujejo in porajajo nove ideje.

Vseh tečajev se namreč udeležujejo mnogi iz drugih esperantskih društev – to je izreden dosežek, saj je povezovanje preko regijskih in društvenih meja želja nas vseh. Takega povezovanja nismo mogli pogosto ustvariti, morda dvakrat ali trikrat letno s proslavami Zamenhofovega dne, dnevom odprtih vrat za Dan esperanta ali kakšno izredno konferenco in skupščino.

Do nadaljnega pa velja poziv: vzemite si urico za spletno srečanje, s tehniko bo težava le prvič, če nimate strokovne pomoči ob sebi. **O.K.**

Predavanje o spletnem slovarju

En termin krožka v Kranju, namreč 24. novembra, smo izkoristili za zanimivo predavanje o slovensko-esperantskem spletnem slovarju, ki ga je Janez Jug pripravil za 5. Memorial Lucije Borčič v Zagrebu dne 20. novembra letos.

Na videokonferenci, ki se je udeležilo zaradi pozne najave le 6 oseb, je avtor v esperantu predstavil funkcije slovarja in nekaj primerov uporabe. Udeleženci videokonference so lahko spremljali razlago na 31 slikah PowerPoint predstavitve, ki je tudi v esperantu. Datoteko te predstavitve smo nato poslali vsem članom in prijateljem esperanta z okrožnico ZES. Poglejte si jo in postavite morebitna vprašanja, predvsem pa naš spletni slovar uporabljajte!

Naš spletni slovar na spletišču Termania, kjer je postavljenih 81 različnih slovarjev, ima med drugim funkcijo neposrednega komentiranja slovarskih sestavkov. Vsak uporabnik lahko v ustrezno polje vpiše opazke in predloge. Komentar se shrani in ga urednik slovarja lahko upošteva pri dopolnjevanju gesel in sestavkov.

Slovensko-esperantski slovar Mice Petrič je imel ob spletnem rojstvu 42.350 gesel. Konec leta 2018 smo si v članku biltena zadali bližnji cilj preseči število 43 tisoč gesel. Dokaz da slovar živi je med drugim to, da je bilo 1. decembra letos stanje gesel 43.505. Urednik pa ni le dodajal vsebin, odpravljene so bile mnoge tiskarske in vsebinske napake ter dodana naglasna znamenja na geslih.

Za konec pa še moje osebne izkušnje z uporabo slovarja. Slovar Mice Petrič je bogat s sinonimi in frazami. Čeprav ti včasih niso strogo točni, pa so izredno koristni pri ustvarjanju esperantskega besedila, ker dajejo idejo za različne možnosti oblikovanje misli. Če recimo iščemo esperantski izraz, bomo v tem slovarju našli nekaj predlogov esperantskih besed, nato pa lahko točen pomen besede poiščemo v PIV. **O.K.**

Priročnik za osnovnošolske učitelje

Ne, ne gre za nov učbenik. Gre za zanimivo najdbo pri urejanju arhiva in zapuščine organizacije. Pregledovanje in razvrščanje arhivskega gradiva zahteva veliko časa in prebiranja zaprašenih dokumentov, a zna biti poučno in presenetljivo.

Taka je najdba tipkopisa 89 strani formata A4, s ciklostilom dvostransko razmnoženih ter broširanih z oranžnimi kartonskimi platnicami. Na naslovnici je z roko napisano: Sonja Tavčar, Manlibro por la instruisto en elementaj lernejoj – 1-a parto, 1960. Priročnik je v celoti v esperantu in vsebuje gradivo za 28 lekcij. Vsaka lekcija ima v uvodu seznam novih besed, slovničnih pravil in pomagal za izvedbo lekcije. Glavna vsebina lekcije so učiteljeva vprašanja in odgovori učencev. Čeprav je priročnik pisan na pisalni stroj, so uporabljene velike in male posebne esperantske črke ŝ, ĉ, ĝ, ŭ itd.

Priročnik, katerega je doslej čuval Janez Zadravec, je verjetno eden redkih ohranjenih. Odslej se hrani v strokovni knjižnici ZES, kjer je na ogled zainteresiranim. Vsekakor preseneča njegova kakovostna vsebina in preprosta tehnična izvedba. **O.K.**

Iz dejavnosti EDM

El la agado de ESM



Zamenhofov dan 2020

Osrednja slovenska proslava Zamenhofovega dne naj bi bila letos v Mariboru. Žal ukrepi za omejevanje epidemije covid-19 ne dopuščajo izvedbe proslave in druženja na klasičen način. Zato bo proslava izvedena v obliki spletne videokonference. Program pripravljajo skupaj vse esperantske organizacije v Sloveniji, delo pa koordinira Izvršni odbor Združenja za esperanto Slovenije.

Za nekatere bo morda malo težko prvič v življenju sodelovati pri spletni videokonferenci. Ne ustrašite se! Pokličite na pomoč domače ali sosede, ki postopek že poznajo. Važno je le, da se priključite s pomočjo povezave, ki jo boste prejeli po elektronski pošti. Tudi če na računalniku nimate kamere, boste lahko

spremljali proslavo, ostali udeleženci pa bodo namesto vašega obraza videli le napis z imenom. Vsak udeleženec ima možnost na svojem ekranu z miško vključiti ali izključiti mikrofona in kamero, le spremljati dogajanje ali pa se aktivno udeležiti razprave, kaj sporočiti ali kaj pokazati.

Torej bodite pripravljene v torek, 15. decembra malo pred 18. uro. Preglejte svojo elektronsko pošto in poiščite okrožnico ZES, ki vsebuje povezavo in kodo za vstop na videokonferenco. S klikom in vpisom kode v pozdravno okno boste na letošnji osrednji proslavi Zamenhofovega dne. **M.V.**

Spletni tečaj za začetnike

Po dogovoru na seji IO ZES je kot eno od oblik počastitve spomina na Ludvika Zamenhofa EDM razpisalo spletni tečaj esperanta za začetnike. Tečaj se bo začel 16. decembra 2020 ob 18. uri in bo nato potekal vsako sredo ob istem času. Tečaj bo vodil Peter Grbec, učna podlaga pa bo učbenik *Esperanto po direktni metodi* in z njim povezana pomožna gradiva.



Tečaj je brezplačen in namenjen začetnikom ne glede na starost in kraj bivanja ali društveno pripadnost. Vsi, ki želijo spoznati osnove esperanta na prijeten in sproščen način, naj se pridružijo videokonferencam s pomočjo povezave in prijavnih kod, ki ju bodo prejeli po prijavi na spletni strani <https://esperanto-maribor.si/zacetni-tecaj-esperanta-2020-2021/> ali z elektronsko pošto na naslov društva: info@esperanto-maribor.si. Naj opozorimo, da bodo drugi tečajji na višji stopnji in bodo zahtevali osnovno predznanje jezika. **M.V.**

iz dejavnosti KD SG

El la agado de KS SG

Spletni krožek dvakrat tedensko

Esperantska sekcija KD SG je aktivna tudi v koronskem času. Tudi oni so morali preiti na spletno učenje



esperanta in ponavljanje že naučenega. Mentor Davorin Jurač vodi s pomočjo storitve *meet.google* dva termina tedensko, to je v torek ob 14. uri in v četrtek ob 18. uri. Termina omogočata vsem zainteresiranim vsaj enkrat tedensko udeležbo, kadar služba ali druge obveznosti ne dopuščajo niti virtualne prisotnosti na lekcijah. Največja doslej zaznana udeležba je bila 10 prisotnih na posamezni videokonferenci, seveda tudi iz drugih koncev Slovenije. Poleg tega pa se nekateri člani sekcije občasno priključijo še na tečaja v Izoli in Kranju.

Sekcija je tako predelala skoraj ves *Esperanto po direktni metodi* tudi s pomočjo PowerPoint gradiv Anne Löwenstein k temu učbeniku. Pripomoček za branje in prevajanje v slovenščino pa je bila knjižica Spomenke Štimec *Esperanto ne estas nur lingvo*. Tudi v bodoče bodo lekcije raznolike, a prilagojene znanju na ravni A2 in B1 po lestvici KER. Ta tečaj naj bi v letu 2021 združeval vse »nadaljevalce (progresantojn)« v Sloveniji.



Anna Löwenstein: Esperanto rektmetode – Leciono 19

Poleg marljivosti mentorja Jurača je treba pohvaliti tudi zavzetost ostalih članov sekcije, ki so hrabro preskočili regijske meje in sodelujejo tudi na drugih tečajih. Mi drugi pa z veseljem pridemo na obisk na Koroško, za zdaj le virtualno. **O.K.**

Poemo por la aŭtuna renkontiĝo

Tiun ĉi poemon la verkistino preparis aparte por la ĉi-jara aŭtuna renkontiĝo de la esperanta sekcio de la Kultura Societo Slovenj Gradec. Do, ĉar la pandemio de la koronavirusa malsano malebligis iujn ajn kunsidojn kaj festojn, ni helpas aperigi la poemon kaj oferi ĝin al plej larĝa publiko.

Ivica Haco (elslovenigis Vinko Ošlak)

Malmulte – nu multe
mi deziras
da kor',
da senbru'
kaj da pan'!

Por ke en blinda malhel'
ĉe la disira vojar'
mi de ĝusta direkt' ne perdiĝu.

Malmulte – nu multe
mi deziras,
vi voĉo, por diri al mi
meze de la silent',
kiam forpasos dolor'?

Dum la militoj kaj maljustaĵar'
vi trovas la koron,
la panon,
la pacon
nek en la song'.

Mi deziras
malmulte – nu multe
ekster kaj ene de ni
malbruon, trankvilon,

por la voĉon povi ekaŭdi,
por tempon sovaĝan ekkapti,
por salti en piedingojn
meze de l' situaci'.

Iz dejavnosti ŽED

El la agado de FES



Železniĉarsko Esperantsko Druŝtvo
Druŝtvo za uporabo Mednarodnega jezika v prometu
Fervojista Esperanto Societo
Societo por apliko de Internacia lingvo en la trafiko

El fervoja mondo 3/2020

Aŭstrujo

Aŭstrujo ofertas multajn eblojn por ekskursoj. Ekde urboj ĝis alpaĵaj montoj. Ni elektu turisme allogan regionon kun *Krems an der Donau* kaj etŝpuran fervojan linion *Sankt Pölten – Mariazell*. Ekzemple veturante el Ĉeĥio, eblas elekti iun el modernaj trajnoj *railjet* aŭ *InterCity*, kiuj aŭ finas, aŭ haltas en Viena ĉefa fervojstacio.

De tie ĉi estas konvene veturi per rapida urba trafiko (S1, S2) direkto *Floridsdorf* kaj en la stacio *Wien Handelskai* transiri al kontaktolinio S45 trafikanta al

Hütteldorf. Elektra trajnunuo post kelkaj minutoj haltas ĉe fervoja stacio *Wien Heiligenstadt*, de kie trafikas trajnoj en direkto *Tulln* kaj *Krems*. Ĉar restas kelkaj liberaj minutoj antaŭ forveturo de nia trajno, ni antaŭ stacidomo rememoras postrevolucionan tempon (1989 en Ĉeĥio), kiam ni ĉi tien venis en decembro per trajno "Svoboda" (Libereco) el Prago tra Vieno. Kaj same kiel tiam, ankaŭ ĉijare nin ekinteresis grandlitera surskribo sur unu el domblokoj *Karl Marx-Hof*. Estas videble, ke Aŭstrojn iu Karl Marx povis neniam enekstaziĝi. Kaj kvankam estas vero, ke tre ĝojigis ilin, kiam en la jaro 1955 la lastaj soldatgrupoj de Ruĝa Armeo, danke al subskribo de la kontrakto pri neŭtraleco, forlasis Aŭstrujon.

Post momento tamen venas el proksima *Franz-Josefs Bahnhof* aŭ Stacio Francisko Jozefo duetaĝa regiona trajno alinomata *Wiesel* (Galputoro) kun elektra lokomotivo serio 1144 en direkto sur fervoja linio nomigita post Francisko Jozefo ĝis *Krems*. La trajno ne estas plenokupita, ni do okupas sidlokojn dekstraflanke kun elrigardo al Danubo. Aliaflanke rapide preterpasis ekzemple monumenta monaĥejo en *Klosterneuburg*, kiu jam pli ol naŭ jarcentojn apartenas al la plej elstaraj sakralaj kaj kulturaj centroj en Aŭstrujo. Al fervojamantoj de amasa trafiko ni memorigu, ke ĝuste el *Klosterneuburg* al najbara *Weidling* gvidis unu el la unuaj trolebusaj linioj en Aŭstrujo-Hungaruja Monarĥio. Trolebusoj, tiam nomataj kiel *Gleislosbahn* aŭ Senrela linio, kunligis en la jaroj 1908 ĝis 1919 stacion en *Klosterneuburg* kun malpli ol kvar kilometroj distanca civito *Weidling*.

La trajno tamen galopas plu ĝis fervoja trajnkruciĝo en *Tulln*, kie la linio sekciĝas. En direkto maldekstren la trajnoj trafikis al *Sankt Pölten*, kaj dekstren tra fervoja ponto transiranta Danubon male al *Krems*. Kaj ĝuste ĉi tien kontinuas nia vojo tra malaltaĵa pejzaĝo nomata *Weinviertel*, kio en simpligita traduko signifas vinbereja regiono.

Laŭlonge Danubo ĝis vinberejoj

Weinviertel estas historia teritorio en nordokcidento de federacia lando Supra Aŭstrujo. En sia orienta fino ĝi estas limigita de la rivero Moravo kaj Slovakujo, en nordo de Moravio kaj de la rivero *Dyje*. La regiono *Weinviertel* laŭ oficialaj donitaĵoj estas la plej granda vinberkulturista regiono en Aŭstrujo. Sur pli ol 16500 hektaroj da fekundaj vinberejoj onidire estas rikoltata kaj produktata triono (!) da ĉiuj aŭstraj vinoj. Maturiĝas ĉi tie ne nur *veltina verda* kiel tipa vario de la regiono, sed ankaŭ bongusta *chardonnay* aŭ *rulanda blanka*. Kontentaj estas ankaŭ ŝatantoj de ruĝa vino, la regiono *Weinviertel* famas pri siaj varioj *Blua Portugal* aŭ

Zweigeltrebe. En tiun ĉi regionon estas vere plej bone veturi trajne, ĉar en haltejoj survoje eblas kie ajn eltraĵiĝi kaj veni gustumi vinon en kiu ajn vinfarejon. Ŝatantoj de bicikloturismo povas sian ekskurson plilongigi eĉ je kelkaj tagoj danke al kvarcent kilometrojn longa bicikla veturvojo nomata *Weinstrasse Weinviertel*. Sed ni revenu en la trajnon. Post traveturo de la vastaj vinberecoj kaj vingardenoj nia regiona duetaĝa trajno proksimiĝas ĉirkaŭ post sepdekminuta veturo al sia celstacio – Krems, kun plena germana nomo *Krems an der Donau*.

Temas pri kvina plej granda urbo en Malsupra Aŭstrujo. Certe ĉiu konas Kremson mustardon, (en germana originalo *Kremser Senf*), kiu vere devenas el malsupreaŭstra *Krems*, kvankam nuntempe ĉi tie ne plu estas produktata. El fervoja stacio ni ekiras trarigardi iomete la urbon. Ĝia centro ne estas maproksime, nur kelkajn minutojn da piediro.



Post nelonge ni jam troviĝas en historiaj stratetoj de romantika urbo kiu nun estas memorrezervejo kaj krome parto de la monda heredaĵo de *UNESCO*.

Elstaran parton de urbaj enspezoj formas enspezoj el turisma movado kaj krome eblas ŝipekskursi el *Krems* ĝis iomete pli malproksima *Melk*, kie situas unu el la plej grandaj aŭstraj monaĥejoj.

La unua skriba dokumento pri *Krems* devenas el la jaro 995 kaj montras al romia deveno. Bazan signifon por evoluo de la urbo havis periodo de regado de la ĉeĥa reĝo *Přemysl Otakar II-a*. Paradajn domojn, en vico starantajn, bone konservatajn ĝis nuntempo, komencis konstrui urbaj kaj kortaj oficistoj. Ekzemple palaco kun turo el dua duono de 13-a jarcento, nomita laŭ la posedanto juĝisto *Gozza*, kiel *Gozzoburg*, ofertas por pririgardo surmurajn pentraĵojn, inter tiuj ankaŭ la plej malnovan bildigon de moravia aglino, emblemon de Ĉeĥa reĝlando. Ŝatantoj de historio certe indus viziti kelkajn interesajn preĝejojn frunte kun Paroĥa preĝejo de Sankta Vito kaj Hospitalan preĝejon de la sanktaj Filipo kaj Jakobo.

Trajne en direkto Sankt Pölten

Nia planata tempo en Krems malrapide finas kaj ni revenas al fervojstacio de Aŭstraj Federaciaj Fervojoj.

Kiel tradicie en ĉiu stacio *ÖBB*, ankaŭ en *Krems* troviĝas memserva vendejo de manĝaĵoj, kiu helpas savi vojaĝantojn de malsato kaj soifo. Ĝentila junulino ĉe kaso ĉion vigle kalkulas, la prezoj estas akcepteblaj, altkvalita alpa trinkakvo malvarma. Ni do rapide transiras al dua kajo, kie jam staras preparita trajno kun du malnovaj motorvagonoj de seio 5047 en direkto al metropolo de Malsupra Aŭstrio *Sankt Pölten*, en traduko Sankta Hipolito. La motorvagonunuoj facilmove ekveturas kaj post vojaĝo tra rava pejzaĝo en ĉirkaŭaĵo de *Krems* ni baldaŭ venas al *Herzogenburg*, kie aldoniĝas "*Traimauera*" branĉo de Okcidenta fervojo aŭ *Westbahn*, kunliganta Vienon kun *Linz* kaj *Salcburgo*. Post plia kvaronhoro la trajno jam bremsas en vasta stacio en *Sankt Pölten*. Unue ni ekiras por nelonga vizito de la urbo. Kvankam ĝi estas rava, la vico de originalaj domoj aŭ konstruaĵoj de moderna arkitekturo, inkluzive la monumentan stacidomon, ne estas komparebla kun *Krems*. Por vizito certe indas la centro de la urbo kun sia laŭlonga placo *Rathausplatz*, ĉe kies suda flanko ni trovas urbodomon, la simbolon de la urbo. La placo estas borderita de barokaj urbanaj domoj, kaj sur norda flanko de *Rathausplatz* staras rokoka franciskana monaĥejo kaj preĝejo kun altaro kaj bildoj de la baroka pentristo *Martin Johann Schmidt*.



Atrakcio estas veturo per etŝpura fervojlinio *Mariazellerbahn*

Kulmino de nia ekskurso en Malsupra Aŭstrujo estas veturo per elektra etŝpura fervojlinio, konata kiel *Mariazellerbahn*. Etŝpura fervojlinio kun ŝpuro nur 760 mm direktas al 84 km distanca *Mariazell* kaj survoje ĝi superas la altecdiferencon da 618 metroj! El pilgrimloko *Mariazell*, kiu situas jam en najbara Stirio, origine la linio pluiris ankoraŭ kelkajn kilometrojn al *Gusswerk*, kie la trafika ĉesis en majo 1988. La origina *Niederösterreichische-steirisch Alpenbahn* estas ekde tempo de elektrizo ekspluatata kun iomete nekutima unufaza alternkurento 6,5 kV, 25 Hz. En la jaro 2010 Aŭstrajn

Federaciajn Fervojojn anstataŭis nova posedanto, la kompanio *NÖVOG*.



En unuaj kelkaj kilometroj la linio trairas plejparte tra agrikultura monteta pejzaĝo al stacio *Ober-Grafendorf*, de kiu pli frue iris neelektrizita branĉtrako al *Bischofstetten*. La etŝpuraj reloj pluiras tra la valo de rivereto *Nattersbach* ĝis stacio *Laubenbachmühle*, kie iuj trajnoj finas la veturon. De ĉi tie poste komencas la linio abrupte supreniri tra kelkaj helicojdoj ĝis kulmina tunelo *Gösing*, kie ni atingas la plej altan punkton de la fervojlinio – 892 metrojn super marnivelo. En finstacio *Mariazell*, kiu situas fakte en civito *San Sebastian*, eblas trajnŝanĝo al muzea linio kun normala larĝoŝpuro 1435 mm. La tramlinio sur dukilometra sekcio ofertas veturon en diversaj tipoj de historiaj tramoj, inkluzive vaporaj. Atenton! La tramlinio trafikis nur ekde junio ĝis fino de oktobro. Tamen ĉiuj ŝatantoj de reltrafiko devus noti tiun ĉi ekskurson kiel devigan, ĉar temas pri vere nekutima travivaĵo. Precipe por mezeŭropanoj el ĉirkaŭaj proksimaj landoj.

Resume:

Elektrizita fervoja linio **ÖBB 810** kunligas Vienon kaj *Krems an der Donau* tra *Tuln* kaj *Hadesdorf am Kamp*. Sur la fervoja linio trafikis duetaĝaj trajnoj formitaj de pasaĝervagono kun kondukistejo serio 86 – 33, nomataj *Wiesel* (Galputoro), kaj elektraj lokomotivoj el serioj 1142 aŭ 1144. Daŭriga neelektrizita fervoja linio **ÖBB 820** estas kunligo inter *Sigmundschnberg*, *Horn*, *Krems* kaj *Sankt Pölten*, kie trafikis motorvagonoj de serio 5047 en mempriserva trafiko sen konduktoj. Etŝpura fervoja linio *Sankt Pölten – Mariazell* kun ŝpuro 760 mm estas posedata de la kompanio *NÖVOG*. Sur la linio trafikis basplankaj modernaj trajnunuoj *ET* de la firmao *Stadler Rail*, de tempo al tempo historiaj trajnoj estas gvidataj de elektraj lokomotivoj de serio 1099, liveritaj en jaroj 1910 ĝis 1914 kaj pli poste modernigitaj. Akomodis: **J.M.**

Finna Avo Frosto ankaŭ ĉijare sendis leterojn al slovenaj infanoj.

Sekretario de FES Maribor havas bonajn kontaktojn kun la finnlandaj esperantistoj. Li bone konas la morojn dum la Julemiko en Skandinaviaj landoj. Tiel komencis nia artikolo en la pasintjara novembra gazeto *Informoj*. Ĉi-novembra societa ago estas ripeto kaj plibonigo de la pasintjara. Plibonigo tiusence, ke pro striko de poŝtistoj en novembro 2019, infanoj ricevis leterojn nur komence de la januaro – ĉi-jare. Laŭ nia scio Poŝtoj nun bone funkcias, kaj leteroj al infanoj devus veni ĝis mezo de la decembro.

Intence nia societo ankaŭ venontjare ripetos ĉi-agon. **K. K.**

Jula rakonteto el la pasintaj tempoj en postmilita lando

Ie iam, antaŭ longe vivis knabineto, kiu nomiĝis Pirjo. Ŝia nomo devenis de Birgit, sed ŝi ne tion sciis, ŝi kaj ŝiaj samlingvanoj ne sciis prononci B kaj G. Malgraŭ tio Pirjo estis sufiĉe feliĉa. Jam venis vintro kaj ŝi ĝuis la neĝon, precipe la skiadon. Sketilojn ŝi ne havis, sed ŝi ne malĝojis, ĉar ankaŭ la aliaj homoj en ŝia vilaĝo ne havis sketilojn. Ŝiaj vestaĵoj ne estis novaj, kontraŭe. La vestaĵojn ŝi heredis de pli aĝa fratino aŭ de kuzinoj. Tamen nun estis escepto. Panjo kudrigis por ŝi belan robon. Tio malofte okazis, ĉar en tiu fora pasinta tempo estis malfacile aĉeti ŝtufon kaj pagi al la kudristino. Sed ne gravis, nun ŝi surhavis sian novan lanan robon, ĝi estis varma, blua, ŝatinda. La butonoj aspektis kiel brilaj amanitoj. Amuze! Ŝi ofte fingrumis la butonojn kaj rerigardis ilin. Sub la robo ŝi havis purajn ĉemizon kaj kalsoneton, surpiede dikajn kaj longajn ŝtrumpojn trikitajn el lano. Ili iom jukis ŝian haŭton ĉe la gamboj, sed ŝi alkiutimiĝis. Ŝia longa densa hararo estis lavita, sekigita, brositita, kombita kaj kunigita en du dikaj brilaj plektaĵoj. Malofte la patrino lavis ŝian hararon, eble unu fojon en monato aŭ du monatoj. Estis ja malfacile lavi ĝin en la brulvarma saŭno sen duŝo, sen krano, la sapo bruldoloris en ŝiaj okuloj. Sed grave nun estis, ke la harplektaĵojn ornamis du grandaj ruĝaj bantoj ĉe la pinto. Ankaŭ la rubandoj estis lavitaj kaj gladitaj! Ŝi sentis sin vere pura kaj bela, esperplena.

Estis la 24a de decembro, la plej granda festo de la jaro. Kvankam ŝia patro ĉiujare diris, ke la infanoj ne havos donacojn, ŝi skribis leteron al Joulupukki, la fabela bonvola virego, kiu al ĉiu finna domo kaj bieno venis per sledo tirata de ĉevalo. En sia letero ŝi petis, ke Joulupukki donacu al ŝi fabellibron. Pirjo tre ŝatis fabelojn, sed ne la timigajn. Dankon al la familia

kuracisto, Panjo sciis, ke Pirjo ne eltenas kruelajn legaĵojn kaj ke la fino neniam estu malfeliĉa. Espereble ankaŭ Joulupukki sciis tion. La leteron Pirjo starigis en la neĝo inter la siringoheĝo kaj dika pino. Poŝtmarkojn ŝi ne havis, monon ŝi ne havis kaj ne sciis la precizan adreson. Tamen ŝi gaje kaj firme kredis, ke la julaj koboldoj forportos la leteron al la Orelmonto* en Laponio, kie Joulupukki tiam loĝis kun siaj edzino kaj koboldoj. Pirjo miris, ĉu li havas tiom da infanoj. La koboldoj ja ĉie embuskas kaj gvatas, ĉu ŝi bone kondutas, diris la plenkreskuloj.

La tempo pasas tro malrapide. En la tagĉambro patro starigis la piceon, kiun li estis preninta el sia propra picearo. Li iom grumblis, ke ĝi ne plu kreskos por fariĝi mono-dona ligno. Ne, ĝi estas starigita kiel festoarbo, la infanoj rajtas meti sur ĝin ornamaĵojn, kiujn ili mem faris, kaj la fragilajn vitrobirdojn de Panjo, kaj la aĉetitajn blankajn kandelojn. La piceo bonodoras kaj belegas. En la manĝoĉambro, kiun la familio uzis nur dum Jula festo kaj dum la naskiĝtago de la patro, staras tablo kovrita de mirinda tuko brodita de Panjo. La manĝilaron kaj porcelanan servicon nun metitajn ili uzas nur dumfeste. Ankaŭ la pladoj estas tiaj, ke tio haveblas nur dum la jula sezono. Dankon al la granda laboro de la gepatroj kaj la hejme buĉita porko: ŝinko, kolbasetoj, fiŝaĵoj, diversaj pladoj el karotoj, ruĝaj betoj, brasiknapo, terpomoj, kaj por deserto rizokaĉo kun cinamo kaj sukero, kompoto el sekigitaj prunoj kaj aliaj fruktoj. La freŝaj oranĝetoj en malnova ligna ujeĝo aspektas kiel someraj suneto en la vintra malhelo. Ili ankaŭ plaĉe bonodoras.

Post la frandinda manĝo audiĝas bruegokorbego, per kiu oni kutime portas lavitajn tukojn kaj vestojn. Lia vizaĝo aspektas ne homa, ĉar li surhavas maskon kun longa blanka barbo kaj okulvitroj, tra kiuj la okuloj blinkas. Li diras, ke li malbone vidas, kaj petas iun alian legi la nomojn sur la pakaĵoj volvitaj en buntaj julpaperoj. Surprize! Malgraŭ la antaŭdiro de Paĉjo ĉiu familiano ricevas 2-3 donacojn! Pirjo kun granda intereso sekvas la malfermadon: lanaj ŝtrumpetoj, lanaj trikitaj gantoj, rozkoloraj subvestaĵoj, noktoĉemizoj... Sed kie estas la FABELLIBRO petita de ŝi? El la volvaĵoj aperas nur skribiloj, farbokraĵoj, kajero... kaj denove pliaj vestaĵoj. SED KIE LA FABELOJ? Pirjo ektimetas, ke ĝi ne troviĝos en la korbego.... Joulupukki jam foriras dirante, ke li devas iri al siaj ĉevalo kaj sledo plena de donacoj por aliaj infanoj en la vilaĝo.... Paĉjo lin dankas etendante al li glaseton da brando. Pirjo amare pensas, ke ankaŭ en aliaj hejmoj oni tiel regalas Joulupukki kaj ke li ebriiĝis kaj forgesis ŝian libron. Ŝi preskaŭ ploras. La kandeloj kaj fajreroj de ĝojo kaj espero estingiĝas en ŝiaj okuloj. Ŝi provas

kaŝi sian vizaĝon per la basko de sia robo. Paĉjo kaj Joulupukki estas elirontaj, sed tion ŝi ne volas vidi. Joulupukki iom riproĉas la infanojn, ke ili ne kantis julajn kantojn por li. Strange ke li ne scias, ke en tiu ĉi familio oni ne muzikas, ĉar la patro ne eltenas miskantadon. Ankaŭ li ne plu kantas, sed kelkfoje li ludas violonon, nur por si, sen aŭskultantoj, kiujn li petas eldomiĝi, kvankam la eta Pirjo tre ŝatus aŭskulti muzikon. Violono estas ŝia plej ŝatata instrumento.

Kiam Paĉjo revenas tra la pordo, li portas en siaj manoj ne malgrandan pakon. Li diras, ke li trovis ĝin en la neĝo apud la sledo de Joulupukki. Li serĉas la nomon sur ĝi, trovas kaj en klara voĉo legas: *Bonan Julon al Pirjo, deziras Joulupukki!* Ŝia espero revenas. La ĝojofajreroj reaperas en ŝiaj okuloj. La kandeloj pli forte lumas. Paĉjo enmanigas al ŝi la pakaĵon kaj ŝi singarde malvolvas la buntan paperon, sen ŝiri. Malrapide eliĝas dika libro, ĝuste tiu fabellibro, kiun ŝi deziris kaj atendis. Grandan dankon al Joulupukki!

*Orelmonto, finne Korvatunturi, situas en orienta Laponio. Nuntempe Joulupukki loĝas rande de la urbo Rovaniemi. Li pli kaj pli imitas Santa Klaŭson. Verkis: "Saliko"

Iz zgodovine gibanja

El la movada historio

Vinko Oŝlak:

La nekonata rolo de Esperanto dum la proceso de sendependiĝo de Slovenujo

(El la en Esperanto verkita, ne jam publicita libro: *La transtempa letero al Hannah.*)

En la jaro 1991 mia naskiĝlando per preskaŭ 96-percenta plebiscita rezulto forlasis la ŝajne federacian kaj eĉ pli nur ŝajne socialisman ŝtaton Jugoslavujon. Mi tiam, rigardate de la nuna perspektivo, tro forte kaj naive esperis, ke tio signifos en ĉiuj aspektoj pli bonan perspektivon por mia popolo. Mi eĉ tre forte min politike eksponis. Ne rekte flanke de la politikaj fortoj, kiuj spite la unupartian, tamen jam iom pli lozan politikan sistemon estiĝis en Slovenujo, sed precipe per kolumnoj en la revuo *Celovški Zvon*, kies ĉefredaktoro mi tiam fariĝis, kaj per mia iniciato, fondi la tutslovenan organizaĵon translime kaj transkontinente laŭ la modelo de la *Juda Mondkongreso*, kies centro ne sidas en Israelo, sed en Usono.

Okaze de *Draga* en Tergesto, fakte super la urbo en la vilaĝo Opčine / Opicina, mi proponis, ke ni tuj surloke fondu la organizan komitaton por prepari la fondon de la estonta organizaĵo *Svetovni Slovenski Kongres* (Tutmonda Slovena Kongreso). Tuj post mia propono venis al la mikrofono d-ro Dimitro Rupel, slovena verkisto kaj poste slovena ministro pri eksteraj aferoj, kaj li subtenis mian iniciaton. Tiel vere ankoraŭ samtage kunsidis la inica grupo kaj fondis organizan preparkomitaton, kies sekretario fariĝis mi, dum la prezidanto fariĝis grava slovena elmigrinto, kies nomo momente ne venas en mian kapon.

Verdire la komenca ideo de tiu ĉi organizo ne estis mia. Jam kelkaj homoj – ĉiam temis pri verkistoj – ĝin formulis, tamen neniam tiel konkrete, ke tio kondukus al praktika ago. Ankaŭ la bazan filozofion tiuj sugestoj ne havis. Mi formulis ĝin surbaze de la origina, do juda kongreso. La ideo estis, ke nacioj en tiel necerta situacio, kiel la slovena, apud sia ŝtato, se ĝi estus sukcese realigita, nepre bezonas ian eksterteritorian organizaĵon, kiu ekzistus sendepende de la slovena ŝtato kaj povus laŭ bezono aŭ en tre streĉa situacio funkcii kiel savboato, sufiĉe malproksima de la ŝtata »ŝipo« por ne droni kune kun ĝi. En normala situacio ĝi povus esti kuna tribunon kaj servo por ĉiuj slovenoj laŭ la modelo de la ĉefa esperantista organizaĵo UEA kun sia delegita reto, senkonsidere ĝian praktikan eblecon kaj eventualajn mankojn. Mia prikongresa »filozofio« estis bone akceptita kaj nia preparkomitato tuj komencis labori. Ĝia centro troviĝis ĉe mi en Klaŭdiforumo. Post kelkaj monatoj iu pli riĉa slovena elmigrinto el propra poŝo financis por ni etan kancelarion, simplan komputilon ATARI, kiu povis utiligi slovenajn diakritajn supersignojn por la literoj: ĉ, ŝ, ž, kion la sistemo de IBM tiam ne kapablis, kaj ankaŭ honorarian dungitecon por administra sekretario, kiu min asistis. Ŝi estis studentino el Bonaero, kiu venis por labori dum du jaroj ĉe la Katolika Agado en Klaŭdiforumo. Tiel fraŭlino Tekavec estis mia kolegino ĉe mia laborloko kaj en sia libera tempo mia administra sekretario por la preparkomitato de la estonta Tutmonda Slovena Kongreso.

Samtempe okazis alia interesa afero, fakte decida por la slovena nacio, kiel la sekvaj eventoj baldaŭ montris. Mi flegis sporadan telefonkontakton kun s-ino Donĉević, sekretario de la Kroata katolika misio en Kolonjo (Köln), do iamaniere mia kolegino. Ŝi foje min vokis por iomete informiĝi, kio nova ĉe la slovenoj, politike kompreneble. Kiel la slovenoj, ankaŭ la kroatoj jam fajrece sin preparis por »la tago X«, kiam ankaŭ ili forlasos Jugoslavujon. Neniu povis supozi, ke ili tion faros tagon post la eliro de la slovenoj. Tiel ŝi unu tagon min demandis, ĉu mi estus preta paroli favore al

la slovena memstariĝa intereso enkadre de la »kroata tago« en la eŭropa parlamento en Strasburgo, kion proponis kaj atingis d-ro Otto von Habsburg, eŭropa parlamentano de Bavario. Kroatoj en tiu momento estis kavaliroj kaj invitis slovenojn aliĝi kaj uzi okazon al la eŭropa politika mondo diri pri siaj politikaj aspiroj. Mi tuj respondis, ke mi sentas min ekstraordinare honorita, tamen mi ne estas konvena persono por tiu unika okazo, ĉar mi vivas ekster la limoj de la respubliko Slovenujo, kio min faras politike elmigrinto, kaj tiel senkompetenta por tiel destina alpaŝo. Sinjorino Donĉević demandis, ĉu mi eventuale havas alternativan proponon. Mi respondis jese kaj proponis la homon, politike ekscelente kvalifikitan, d-ron Franciskon Buĉar, kiu poste fakte fariĝis la unua prezidanto de la unua slovena plurpartia kaj tiel demokratia parlamento. Mi ne bedaŭras mian proponon, ĉar li sian rolon en Strasburgo brile plenumis kaj riske je sia kapo esence kontribuis al la fondo kaj internacia rekono de la memstara slovena ŝtato.

Mi revenu al mia propono, ke d-ro Buĉar veturu paroli en Strasburgo ... Persvadi lin tion fari ne estis tiel facila afero. Unue, kiamaniere lin atingi, ja mi supozis, ke la komunisma sekretservo Udba lian telefonon kontrolas same, kiel mian en Klaŭdiforumo. Mi tamen lin vokis kaj diris, ke la tago estas vere bela kaj ni povus iomete kune promeni tra la urbo. Li tuj komprenis, ke mi ne invitis lin ĝui belan tagon, sed ke temas pri io tre grava. Lia politika instinkto estis tre forta. Post du horoj li kaj lia filo – denove pruvo, ke li konsciis pri la graveco de mia alvoko – sonoris ĉe nia pordo en Viktringer Ring 25. Por eskapi subaŭskultadon mi ilin invitis tuj iri tra la urbo. Kaj surstrate mi rakontis al li pri mia interparolo kun la sinjorino el la Kroata katolika misio en Kolonjo. Kaj mi diris al li pri mia propono, ke tien veturu li, ĉar mi tion vidas la plej fekundpromesa ŝanco. Lia unua reago estis absolute negativa, li insistis, ke mi mem tien veturu, finfine la kroata propono estis adresita al mi. Mi klarigis al li miajn argumentojn, ke tien devas veturi persono de alta politika renomo, eĉ se momente en malgraco fare de la komunista nomenklatureto. Lia sekva kontraŭargumento estis, ke li fakte ne regas sufiĉe bone la lingvojn, en kiuj oni povus paroli antaŭ la tiel grava asembleo. Li diris, ke en la gimnazio li kiel la unuan fremdan lingvon lernis la francan, sed li ĝin longe ne uzis, do estus problemo. Ĉar mi iomete konis lian biografion, mi memorigis lin pri la fakto, ke li dum la 60-aj jaroj estis stipendiulo de Eisenhower en Usono, kie li studis por habilitiĝi kiel universitata profesoro pri juro, do li evidente bone scipovas la anglan. Li denove argumentis, ke de tiam pasis multaj jaroj... Tiam mi kiel mian lastan argumenton uzis Esperanton. Mi diris: »Profesoro, mi akceptas vian ekskuzon, se vi subskribas

al mi vian eldiron, ke vi, eĉ iama studento de la tria grado en Usono, ne havas lingvan kompetentecon por paroli en la eŭropa parlamento, ĉar mi ĵus preparas libron pri Esperanto¹ kaj la fakto ke unu el la plej alte kompetentaj slovenaj juristoj spite sian studadon en Usono ne scipovas la anglan, estus tre forta argumento por Esperanto. Tiam li kaj lia filo laŭte ekridis kaj la profesoro diris: »Nun vi min kaptis, mi ne havas plu eskapon...« Lia filo aldonis: »Nun vi trafis lian Ahilan kalkanon...« Tiel Esperanto ludis la ŝlosilan rolon, ke la ĝusta homo parolis antaŭ la eŭropaj delegitoj en Strasburgo kaj ke tiel la decidemo de la slovenoj sendependiĝi firmiĝis kaj estis realigita en pleno.

Por konfirmi la tamen amatorecon de la sendependa generacio, li veturis kun sia franclingva parolada teksto, per kiu li rekte postulis ne plu helpi Jugoslavujon per okcidentaj kreditoj, kaj li pasis la ŝtatlimon ĉe Sežana antaŭ Tergesto. Ĉar li kunprenis iom tro da germanaj markoj, la doganpolicistoj okupiĝis pri lia eta mondelikto kaj ne traserĉis liajn poŝojn por trovi la tiel brizantan opozician tekston. Kiam li el Strasburgo reveturis, li prenis la vojon tra Klaŭdforumo kaj min vizitis por rakonti pri la evento, kiu en Labako provokis tre laŭtajn kaj minacajn eruptojn flanke de la reĝimo. Tiel mi pri la tuta aventuro estis informita el la »unua buŝo«. Multaj, kiuj tiam publike proklamis d-ron Buĉar perfidulo de la nacio kaj de la ŝtato, baldaŭ mem savis sian politikan karieron tiel, ke ili mem aliĝis al la fortoj de la sendependiĝo. Nun, kompreneble, ĝuste tiuj sin prezentas kiel la »liberigantoj« de la slovena nacio el la jugoslavuja jugo, dum la veraj pioniroj estas prisilentataj. Sed tio jam estas alia rakonto ...

Obvestila in vabila

Informoj kaj invitoj



Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

UEA

N-ro 916 (2020-11-29)

Reviviga projekto de la Virtuala Kongreso

Ĉiuj VK-spektaĵoj baldaŭ en la JuTuba kanalo de UEA, UEA viva.

Pli ol du mil membroj de UEA partoprenis aŭ poste spektis la programriĉan Virtualan Kongreson (VK) sen lasi sian hejmon. Por konservi tiun unikan sperton, UEA lanĉis la projekton Viva Virtuala Kongreso (VVK) en la JuTuba kanalo UEA viva (youtube.com/user/UEAviva). Sekve ĉiuj esperantistoj nun povas libere sperti kaj rememori pri tiu kongreso. Jam du monatojn, iom post iom oni enretigas la programerojn de la kerna VK, tio estas, la spektaĵojn okazintajn dum VK-semajno (la 1-a ĝis 8-a de aŭgusto) ĉiutage inter la 12-a ĝis 18-a horo UTC.

Por konservi la kongresan strukturon kaj por faciligi trovi ĉiun programeron estis kunmetitaj tabelo (<Programtabelo de la Virtuala Kongreso>) kaj listo (<Listo de prelegoj kun videoj>) de programeroj, similaj al tiuj de UK. La listo kaj la tabelo estas libere alireblaj ankaŭ en mondafest.net/programo. La diversaj programeroj en la listo kaj tabelo estas kolorigitaj laŭ sia speco, ekzemple Kongresa temo, sciencaj programeroj (IKU, AIS, Scienca Kafejo), distraj (koncertoj, kantaj aŭ muzikaj eroj), kulturaj (literaturo, aŭtoraj momentoj), ekskursoj, prelegoj ktp.

Fine de la projekto estos videblaj ĉiuj spektaĵoj de la kerna VK-programo. Entute estas 99 programeroj, el kiuj pli ol 70 jam estas alŝutitaj al la kanalo de UEA en JuTubo; ĉiutage aldoniĝas unu programero.

UEA esperas, ke en tiu formo la unua Virtuala Kongreso de Esperanto plej utile konserviĝos en la reto kaj estos facile alirebla por ĉiuj esperantistoj. Kiel servo al la E-komunumo, UEA aparte invitas tiujn, kiuj siatempe ne povis partopreni, sperti la unuan Virtualan Kongreson per JuTubo.

Kion oni legos en la sekvonta numero?

Por la sekvonta numero de *Informacije / Informoj*, kiu aperos meze de marto 2021, ni antaŭvidas la raportojn pri la vintraj aranĝoj en Esperantujo kaj la raportojn pri la reta kunveno okaze de la Tago de la Esperanto-libro kaj la Zamenhofa Tago. Krome ni atendas la artikolojn pri:

- aktualaj retaj kursoj en Slovenujo
- kurso MLA en la retejo lernu.net
- la faka biblioteko de SIEL dise
- kion oni preparas por la 100-jara jubileo de ESL
- el la historio de nia movado ktp.

La redaktoro rekomendas sin por kontribuoj pri via agado, proponoj, komentarioj, fotoj kaj rimarkoj, kiuj

¹ Mi ne blufis, mi fakte tiam preparis libron, kiu baldaŭ poste aperis ĉe la eldonejo Voranc en Slovenio: *Pojasnilo*

prijateljem o esperantu (Klarigo al amikoj pri Esperanto), Ravne na Koroškem 1997.

povus interesi la legantaron. Aparte estas bonvenaj verkoj en Esperanto, ĉar ni ĉiuj bezonas ekzerciĝon kiel aŭtoroj kaj legantoj. **O.K.**

Pa ŝe to....

Kaj ankaŭ tion ĉi...

Sankta Marteno la 11-an de novembro ŝanĝis moston en vinon. Ĉijare oni ne festis la tradicion multe pro la pandemio de la koronavirusa malsano. Tamen ni memoru la sanktulon per laŭ li nomita poemo!

Tomaž Longyka elslovenigis la *Baladon pri sankta Marteno* de Anton Aškerc (1856 – 1912) okaze de Zamenhofa Tago 2014. La unuafoja publikigo de la poemo en Esperanto okazis en *Informacije / Informoj* en februaro 2015.

Anton Aškerc

Balado pri sankta Marteno

*Uf, kia vintro! Lupoj cent!
Ne vidos viva min tegment'.
Kiel, plenluno, vi elĉiele ridas!
Domaĝe ke vi ne varmigas!
Bastian, ĉu vojeraris vi?
Ĉu estas ĝusta vojo ĉi...
Ventneĝas, akre vento blovas,
neniu dom' sin tie trovas.
Jes, tamen, estas tie ĉi
eta kapel' – ŝajnas al mi.
La kapelet' de Sankt-Marteno,
patron' de vina fenomeno!
Se mi ne trinkus multon, mi
ne ebrinoktus tie ĉi...
Ne ofendiĝu vi, sanktulo,
se plendas mi al vi, karulo,
vi sciu ke kabanon mi
pli belan havis ol nun vi.*

*Ĝi ne plu estas mia kvartiro,
ĉar vendis ĝin malica sbiro.
Kaj nun Bastian, iam forĝul',
ĉifona estas almozul'.
Pribojas hundoj min surstrate,
tremigas frosto senkomplete.
Sed vintron, nu, ne timas vi -
vestaĵojn vi disdonas ĉi.
Mantelon ĉirkaŭ mi surmetu,
repagi ĝin vi Dion petu.
Ne haku vi duone ĝin!
Per tuta vi ĉirkaŭu min!
Nun ... tiel. Ne ĉesas ĝi brileti!
Oh, domaĝo estus ĝin surmeti...
Povus ja iu ŝteli ĝin
malrezistinte al fascino!
De sojloj homoj nin forpelas,
sanktuloj ankaŭ nin mantelas.
De avaruloj peltojn, fi,
tineoj manĝas, nudas ni...
Ho, mi ripozu, ĝi varmigas,
mantelo, mi enanguliĝas ...*

*Ekmateniĝis. En nirvan'
frostiĝis almozul' Bastian.*



**Feliĉajn Kristnaskon kaj
Novjaron!**

**La jaro 2021 estu plena je
sano, paco kaj sukceso!**

INFORMACIJE / INFORMOJ izdaja / eldonas Zdrženje za esperanto Slovenije / Slovenia Esperanto-Ligo, Štefanova 9, SI-1000 Ljubljana, Slovenija / Slovenujo. <http://www.esperanto.si>. Matična št. / kodnumero 1205226. ID za DDV / n-ro por AVI: 93737777. Poslovni račun / bankkonto: IBAN SI56 6100 0001 2538 761 pri / ĉe Delavska hranilnica d. d.. (Swift-kodo: HDELSI22). Uredil / redaktis Ostoĵ Kristan, lektoriral / kontrollegis Tomaž Longyka.

ISSN 2385-992X Naklada / eldonkvanto: 60

ISSN 2385-9628 URL: <http://www.esperanto.si/eo/bulteno-informacije-informoj-0>